

Irina Bukova: pinta virino

31a jarkolekto - januaro 2010/01

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

**Ne al ĉiuj bonas
Lisbono**

**Kuranta
kurento-krizo**

**Ĉu satanisto
povas administri
ekleziojn?**

s honestaj kaj ka-
plej fortaj gar-
Pro tio ili estas
ataj homoj sur nia
aroj ne povas to-

Germanio inter la
ĵurnalisto devis
, sed tute aparte
e Hitler.

a degeneriĝo Kurt
elokventan voĉon
fuzis fuĝi, ĉar li
vas agi kvazaŭ ĉio

Trevor Steele
Kvazaŭ ĉio
dependus de mi

Trevor Steele

Kvazaŭ ĉio dependus de mi

“Aŭtoro je vere monda nivelo”

Gerrit Berveling

Trevor Steele

Kvazaŭ ĉio dependus de mi



FEL



Ĵurnalistoj, se ili estas honestaj kaj kapablaj, estas inter la plej fortaj gardantoj de demokratio. Pro tio ili estas inter la plej endanĝerigataj homoj sur nia planedo: koruptaj registaroj ne povas toleri oponantojn.

En la tumulta epoko de Germanio inter la du mondmilitoj sentima ĵurnalisto devis oponi ĉiujn ŝovinistojn, sed tute aparte la leviĝantan movadon de Hitler.

En tiu tempo de morala degeneriĝo Kurt Lenz kuraĝis levi sian elokventan voĉon kontraŭ barbareco kaj rifuzis fuĝi, ĉar li kredis, ke ĉiu el ni devas agi *kvazaŭ ĉio dependus de mi*.

Serio Stafeto n-ro 34
Eldonjaro: 2009

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 380 g,
344 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-41-6;
prezo ĉe FEL: 19,20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (EPUB aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 11,50 EUR

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - rebutiko@fel.esperanto.be


Pinta virino

Elektita en oktobro estas virino kiel ĝenerala sekretario de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko). Irina Bukova, diplomato kaj politikisto bulgara, prezentis sin dum la 35a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo kiel produktaĵo de oriento kaj okcidento, kaj devenanta de lando, kie kunvivas kvar religioj...



10

Kuranta kurento-krizo



11

Milionoj da brazilanoj spertis malheliĝon, kiam la 10an de novembro 2009 paneis la enlanda elektrosistemo. Trafis la sekva ĥaoso 18 el la 26 brazilaj ŝtatoj, tio estas 60 milionoj da homoj. Surprizis la malheliĝo aparte la vesperan dungitaron, ĝuste tiam elirantan al laborejoj.

Kion viziti posttagmeze?

Grandeco relativas. Liĥtenŝtejno certe apartenas al la ŝtatoj teritorie ne tro grandaj, sed aserti, ke kelkaj homoj sufiĉas vidi la tieajn vidindaĵojn, estas starpunkto de rapidturistoj. Se oni tranoktus ekzemple en bregenca hotelo, ne restas multa tempo por la celo, kiu situas 100 kilometrojn for. Cetere, la lando apartenas al la plej riĉaj en la mondo, almenaŭ post la dua mondmilito.



15

politiko

KOMUNISMO	9
Vundaj vortoj	
BALKANIO	9
Finfine fiksita	
UNESKO	10
Pinta virino	
LITOVIO	10
Flago-fiago	
INTERNACIA JURO	11
Kuraĝa subskribo	

moderna vivo

BRAZILIO	12
Kuranta kurento-krizo	
ĈINIO	13
Piedetulinioj	
ALBANIO	13
Repatriĝu la patrinon ...	

hobio

KURIOZAĴOJ	14
Kolekti kraĵojn	

turismo

LIĤTENŜTEJNO	15
Kion viziti posttagmeze?	

libroj

Respektinda virino. Granda animo – ĉu iom naiva?	16
Brila perloĉeno	18

spirita vivo

TOGOLANDO	20
Ventreĝo, dua r aldoniĝu	

novelo

Tranĉporto	22
------------------	----

ŝerco kaj satiro

SAMLINGVANOJ	25
Internacia miskompreno	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7-8
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj


Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	35	38	21	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	65
Estonio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (or.)	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Grekio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hispanio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hungario	HUF	7400	8200	4440	1500	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	35	38	21	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Latvio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Litovio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	35	38	21	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovakio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovenio	EUR	35	38	21	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5,5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Poooint Tas 7004, Australia.
Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei
140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio
de Britio, Esperanto House, Station Road,
Barlston, STOKES-ON-TRENT, ST12 9DE,
Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
> Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
- > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de
Pensions 2100-0461-90-0200055053).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Latvia:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
0089 3612 0000).
Reto: esper_lu@geocities.com.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date
Crescent, Christchurch 8025.
Reto: gdewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
> Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
- > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
- > **Slovenaj kaj Slovakaj:**
> Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: beckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
> Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
- > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Kiom da elektroniko?



Antaŭ nelonge ni aĉetis poŝtelefonon por nia nepino, ĉar ĉiuj ŝiaj amikinoj jam delonge posedas tian aparaton. Do ankaŭ ŝi devas havi, ĉar sen ĝi evidente la vivo de 12-jarulo estus mizera. Ŝi havis klaran imagon pri la minimuma ekipo: oni devas ne nur telefoni, sed ankaŭ foti, aŭskulti muzikon, produkti filmetojn, skribi mesaĝetojn per poŝtelefono. Kiam komence (dum pluraj semajnoj) ne bone funkciis telefonado, tio ne multe ĝenis ŝin; gravis, ke ŝi povas foti kaj filmi, instali muzikon – kaj ĉion ĉi konstante ŝi fiere prezentis al ni. Tiam mi komprenis, ke poŝtelefono estas precipe ludilo. Efektive estas nun tre malfacile akiri poŝtelefonon, per kiu oni nur telefonas. Tamen kelkaj produktistoj intertempe proponas denove tiajn simplajn telefonilojn por malmalmodernaj homoj. Sed ordinare poŝtelefonoj estas nun plenŝtopitaj per akcesoraj programoj, tiel ke oni devus trovi tute alian nomon por ili.

Fakte ja abunda elektroniko troviĝas nun en preskaŭ ĉiuj aparatoj kaj maŝinoj. Ekzemple, niaj lavmaŝino kaj manĝilarlavilo proponas dekojn da programoj. Por ni ja sufiĉus kelkaj programoj: por blanka tolaĵo, por bunta, je 30 kaj 60 kaj 90 celsiaj gradoj. Sed estas 23 diversaj programoj, kvankam ni uzas maksimume 5 diversajn. Tamen ni, aĉetante la maŝinon, devis ja pagi ankaŭ la ceterajn 18.

Kaj kiam ekestis eta difekto, la mekanikisto elprenis la kompletan komputileton kaj metis novan en la maŝinon. Li ne kapablis ripari nur la difekteton. Ankaŭ nia aŭtomobilo havas tiom da elektroniko, ke ni devus dum horoj studi la instrukciojn – kaj tamen ĝis hodiaŭ mi ne kapablas simple manipuli la radion en ĝi. La rapidometro sur la biciklo de mia edzino kostis nur ĉirkaŭ dek eŭrojn, sed havas pli ol 20 funkciojn, el kiuj ŝi bezonas nur 3. Sed instali ĝin mem ni ne kapablis, estis tro komplike.

Mi demandas min, ĉu ne ĝustas, ke en modernaj aparatoj malpli da elektroniko estus pli bone. Por resti ĉe la poŝtelefono: ĝiaj fotoj estas miniaturaj kaj mizeraj kompare kun tiuj de normala fotoaparato, ĝia muziko estas mizera kompare kun tiu de kompakta disko ktp. Do kial ne produkti aparatojn kun nur tiuj funkcioj, kiujn ni vere bezonas kaj volas havi? Nia nepo havas rapidometron kun nur kvin funkcioj, kiu estas facile instalebla; li estas tre kontenta. Sed ĝi kostis multe pli ... Ho kia renversita konsumomondo! Kaj atendas nin novaj superelektronikaĵoj, ekzemple nova televidilo kun eĉ pli akraj bildoj. Por tia eta kvalitosalto mi devus pagi plurajn centojn da eŭro – ne, dankon!

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Ferriol Macip i Bonet.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librecozonojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-shi, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Malebligi ripeton de la historio

Kelkaj demandoj miaj ne trovas respondon en la artikolo de Zofia Banet-Fornalowa (MONATO 2009/8-9, p. 25-27). Kial la monda komunumo lasis la naziojn konstrui sian teruran militmaŝinon? Eĉ tion helpis svisaj kaj usonaj bankoj, kiuj prunte donis kaj donacis. Ĉu la financistoj, inter kiuj estis multaj judoj, naive kredis, ke la tiea armeo ekzistos nur en montrofenestro, sen agi sur la tereno? Ĉu la du klanoj, intelektuloj kaj financistoj, interkonkurencis, kiam la dua timis, ke la unua prenos la potencon? Mi rimarkas, ke en la nurenberga proceso oni juĝis nur videblajn aktorojn, sed ne la fabrikantojn de armiloj kaj murdgaso, nek la helpintajn bankistojn.

Cetere mi ankoraŭ ne komprenas, kial la germana popolo kredis, ke nazioj alportos paradizon en la landon kaj sur la tutan teron, malgraŭ tio, ke mi scias, ke bona reklamo povas kredigi ion ajn. Nur kelkaj cerbumantaj malobeemuloj rezistas, sed la plimulto montras sin kiel frenezulojn kaj la potenco kiel herezan malsociemulon. Ĉu oni studas tiujn demandojn en la muzeo? Ĉar, laŭ mi, la kono de la respondo povus malebligi la ripeton de la historio.

Michel MARKO
Francio

Esti usonano aŭ ne (8)

Ŝajnas al mi, ke Obama estas tipa politikisto el Ĉikago – ne tre inteligenta kaj ne tre honesta. Li kondukas same kiel Blagojevich (kiu estis akuzita) aŭ Ryan (kiu estas en prizono). Tamen li estas usona civitano, naskita en Usono.

Allan E. FOSTER
Ĉikago, Usono

Psikologia mistrafo esperantlingva

„Ĉu necesas psikologa rethelpo esperantlingva?” demandas Adam Kiss (MONATO 2009/10, p. 20). Mi serioze dubas.

Dekomence la aŭtoro agnoskas, ke konceptoj pri psika normaleco kaj ne-

normaleco (malsano) estas grandparte relativaj: difinoj malsimilas inter diversaj kulturkomunumoj, eĉ inter malsamaj tempoperiodoj ĉe sama kulturkomunumo. Gravas ankaŭ, ke la propra kulturo de la psikologo signife partoprenas kaj influas lian helpocelan intervenon ĉe malsanulo.

Ege surprizas do la konkluda propono pri ebla starigo de nova „interkultura psikologa servo”, des pli perreta! Konsternas min la penso pri psikologo el Kanado – ekzemple – provanta perrete flegi psike malsanan japaninon, „danke al Esperanto” ... Bonŝancon!

Kapturno ankaŭ rezultas el aludo al ia „esperantista popolo”, kies anoj – konjekteble – suferus de aparte interesaj psikaj problemoj. Danĝera lingvo, tiu!

Laŭ mi, tia propono tute mistrafas. Plej verŝajne ĝi rivelas personan intereson de la aŭtoro pri intelektaj interŝanĝoj pri psikologio kun Esperanto-parolantoj diverslandaj. Tute bone. Tamen estas dubinde, ke ĝi rilatas kuracadon. Mi proponas, ke li starigu novan fakan asocion aŭ tiucelan retpaĝaron anstataŭ nova psikologa retservo.

Jean ALAIN
Kanado

Psikologia mistrafo esperantlingva (2)

„Ĉu necesas psikologa rethelpo esperantlingva?” demandas Adam Kiss (MONATO 2009/10, p. 20). Laŭ mi, tiu demando gravegas, sed ĝi ne vekas sufiĉe da intereso ĉe homoj, kiuj tro facile submetiĝas al „normala kutimo”. Tro ofte homoj ne vidas sian submetiĝon al modo kaj normaleco. Ili ne vidas siajn katenojn kaj sin kredas liberaj, nur

marŝante en la moderneca vento. „Mi estas en mia tempo. Niaj prapatroj tajlis ŝtonajn ilojn. Nun ni uzas komputilojn kaj Interreton”, ili diras. Blinde sekvante la modon, ili eĉ indikas nur retadreson, imagante, ke ĉiujn „normalajn homojn” interligas reto. Tion faras Adam Kiss. Sed mi volas esti mi, eĉ se mi ŝajnas nenormala. Mi ne cedas al reta modo. Mi kuraĝas proklami tion, havante nur poŝtan adreson, faksilon kaj mian mensan sanon.

Michel MARKO
Francio

Kiam komenciĝis la milito?

Naciismo fojfoje forgesigas la plej simplajn faktojn por iel valorigi sian propran nacion. Bardhyl Selimi asertas, ke la dua mondmilito komenciĝis per la invado en Albanion la 7an de aprilo 1939. Tamen en tiu tago Etiopio jam estis okupita de la italaj depost majo 1936 kaj daŭre rezistis. Ankaŭ Ĉeĥoslovakio estis jam okupita de la germanoj unu monaton antaŭ ol Mussolini perfortis Albanion.

En alia monddoparto dum tiu sama 7a de aprilo japanaj kaj ĉinaj armeoj estis batalantaj en Nanĉango, kie 100 000 militistoj mortis. Mi vetas, ke tie neniu rimarkis, ke kelkaj ĝendarmoj albanaj pafis al italaj militistoj en Durrës. La japana militistaro estis atakinta Ĉinion la 7an de julio 1937. Tiel tiu milito inter Japanio kaj Ĉinio, kiu daŭris ĝis la 2a de septembro 1945, estas la plej longa inter du landoj en la dua mondmilito. Ĉiuj tiuj invadoj kaj militoj, kaj ankaŭ la hispana interna milito, estis preludoj al la ĝenerala ekflagro, kiu ja komenciĝis la 1an de septembro 1939, kiam Germanio atakis Pollandon.

Thierry TAILHADES
Francio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualizaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Ĉu satanisto povas administri ekleziojn?

de Vinko OŠLAK



La slovena ĉefministro Borut Pahor.

Ŝajne en Slovenio tio estas ebla. Mi estu justa: ne temas nepre pri vera satanisto, sed pri akuzo de unu el ekzistantaj religiaj komunumoj en Slovenio; kaj ne temas nur pri eklezioj – do kristane nomataj komunumoj – sed pri ĉiuj en la ŝtato troviĝantaj religiaj komunumoj, inter kiuj finfine troviĝas ankaŭ la satana kulto.

Antaŭ nelonge la slovena ĉefministro Borut Pahor por la direktora posteno de la Oficejo por Religiaj Komunumoj nomumis iaman ĵurnaliston kaj deputiton en la slovena parlamento Aleksandron Gulić, sin proklamintan ateiston kaj portanton

de satanismaj simboloj. Ĉefministro Pahor estas cetere estro de la slovena socialdemokrata partio, kies origino ne estas la okcidenteŭrope kutima demokrata tradicio de socialdemokratoj, sed la iama Ligo de Komunistoj, kiu post falo de sia monopola pozicio en Slovenio en la jaro 1989 kolorigis sian kvinpintan stelon flave anstataŭ ruĝe kaj sin reformis ankaŭ nome al Unueca Listo de Socialdemokratoj, el kiu fine eliris la nuna partio de socialdemokratoj.

Konfuza situacio

Tion oni devas scii por iomete kompreni la komedion, kiu en lasta tempo prezentiĝis sur la slovena politika scenejo. Por iomete klarigi la konfuzan situacion, ni aldonu la informon, ke tiu ĉi oficejo ne estas demokratia organo de religiaj komunumoj, sed administra organo de la registaro por havi pli bonan superrigardon pri la scenejo de religia vivo en la lando kaj por kunordigi rilatojn de la ŝtato al unuopaj religiaj organizaĵoj. Tiel la oficejo samtempe estas kontrolorgano de la registaro kaj samtempe poŝtkesto al kiu unuopaj religiaj organizaĵoj sendu siajn postulojn, petojn, kritikajn rimarkojn kaj protestojn.

Dua grava apudinformo estas, ke normale demokratiaj kaj juraj ŝtatoj tiajn oficejojn ne havas; tiu ĉi estas postrestaĵo el la tempo de komunisma diktaturo en Slovenio inter 1945 kaj 1989. Tiam troviĝis simila organo, komisiono por religiaj aferoj, subordigita ĉe la tiama transmisia kvazaŭpartio Socialista Ligo, kiu komplete obeis la regantan Ligon de Komunistoj. Kom-



Aleksandro Gulić - direktoro de la Oficejo por Religiaj Komunumoj.

preneble la tiama organo havis multe pli opresan rolon ol la nuna oficejo.

Katolika protesto

La problemo estiĝis, kiam Pahor forgesis sian inviton al la antaŭa direktoro de la oficejo, d-ro Ĉepar (rom-katoliko), ke li ankaŭ en sekva mandato estu ties direktoro, ĉar ne estis riproĉoj flanke de aliaj religiaj komunumoj, ke li oficus partiece, kaj eĉ islamanoj esprimis kontenton pri lia laboro. Sed la forta kontraŭkatolika grupo premkonsilis la ĉefministron ŝanĝi sian unuan decidon kaj nomumi personon, kiu plaĉis al tiu grupo

de ateismaj malvastuloj. Tiam la rom-katolika eklezio en Slovenio levis sian protestan voĉon, riproĉante al la nomumito satanisman apartenon, ĉar li kiel hobia motorciklisto iufoje surportis ĉemizon kun anglalingva surskribo SATAN'S BROTHERS (= fratoj de Satano). Motorciklista klubo sub tiu ĉi nomo antaŭ jaroj fakte ekzistis, sed Gulić asertas ne aparteni al tiu klubo formalanece.

Sed ŝajnas, ke la vera motivo de la protesto ne estas la karnavaleca ĉemizo, kiu eventuale ne estas la plej konvena uniformo por direktoro de registara Oficejo pri Religiaj Komunumoj, sed la leĝproponoj de Gulić en la tempo de lia deputita mandato. Li proponis ŝanĝojn de la prireligia leĝo, kiu estu pli elasta kaj ebligu ankaŭ al tre malgrandaj religiaj gru-

poj konstituiĝi kiel egalrajtaj eklezioj aŭ religiaj komunumoj antaŭ la leĝo, kio havus ankaŭ financajn konsekvencojn: ja en tia okazo la respubliko pagus por pastroj de tiaj etaj komunumoj asekuran kontribuon, kiel tio nun okazas por ŝtate registritaj komunumoj kaj eklezioj. Kaj paralele temas evidente pri tio, ke la rom-katolika eklezio el sia statistika grandeco – pli ol 60 % apartenas al ĝi – konkludas, ke troviĝas rajto aŭtomate proponi sian kandidaton por tiu posteno kaj ke la registaro devus tion observi por ne esti akuzita agi kontraŭkatolike.

Kompleta nekompreneo

La tuta karnavalaĵo montras jenajn kontraŭdirojn de ĉiuj partneroj, troviĝantaj en ĝi: La registaro

de la ekskomunista koalicio montras kompletan nekompreneon pri la demokratia principo de disigo inter ŝtato kaj religiaj komunumoj kaj eklezioj. Unuflanke ĝi daŭre konservas postrestaĵojn el la komunisma reĝimo, kiel la oficejon, aliflanke ĝi komprenas la principon de disigo negative, kiel en la komunisma pasinteco. La nomumo estis signalo de tia negativa sinteno rilate religiojn.

La nomumito Gulić troviĝas en certa kontraŭdiro. Se li vere estas ateisto, kiel li daŭre proklamas, tiam lia elekto de simboloj montras strangan bildon pri ateismo – aŭ tamen precize la ĝustan: satanisman? Eĉ se oni al li kredas esti nur ateisto, leviĝas la logika demando: kian intereson ateisto povas havi, prizorgi religiajn komunumojn? Por vera ateisto ĉiu religio estas strukturo de popola stultigo kaj memstultigo, de popola opiumado kaj memopiumado, kiel asertis Marx kaj Lenin. Se Gulić tion ne scias, li ne kompetentas esti direktoro; se li scias, do li blufas kaj mensogas.

La rom-katolika eklezio forgesas teologian fakton, ke laŭ la biblia kriterio satanisto estas persono ne nur per tio, ke li demonstros ĉemize aŭ per formala aparteno al iu komunumo, kultanta Satanon, sed jam per tio, ke li ne estas novnaskita kristano laŭ la normoj, starigitaj de Jesuo Kristo mem. Kaj en tiu senco ankaŭ direktoro kun rom-katolika deveno apartenus al la sama kategorio kiel Gulić.

Ĉu bezonata oficejo?

Sed ĉiuj partneroj de la slovena religi-ŝata komedio havas ankaŭ unu komunan problemon. Neniu el ili starigis demandojn: unuflanke ĉu demokratia kaj jura ŝtato bezonas tian oficejon – kaj aliflanke ĉu eklezio, kiu ne nur laŭnome, sed ankaŭ laŭ la kriterioj, priskribitaj en la biblio, estas fondita kaj daŭre gvidata de Jesuo Kristo, bezonas tian oficejon? La respondo estas klara: Nek vere demokratia kaj jura ŝtato nek vere kristana eklezio tion bezonas. Per tio la maskoj kaj kostumoj de la tuta teatra ensemblo falas – la komedio finita! ■



Motorciklisto kiel direktoro de la Oficejo por Religiaj Komunumoj?

Vundaj vortoj



La litova parlamentestro Arūnas Valinskas ofendiĝis pro eldiroj favore al komunistoj.

Litova komunismo, kun 50-jara historio, denove fariĝis tikla afero. Kiam dum kunsido de la Organizaĵo pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, okazinta en la litova ĉefurbo Vilnius en julio, greka parlamentano Konstantinos Alisandrakis eldiris sian opinion favoran al komunistoj, kolegoj el Litovio ne komprenis lin. Kaj ankoraŭ pli: la litova parlamentestro Arūnas Valinskas diris, ke la parolado de la greka gasto ofendis Litovion.

Alisandrakis riproĉis al Litovio limigon de politika libereco kaj glorigon de nazikunlaborintoj. Li atentigis pri nuna malpermeso de komunistaj ideologio, simboloj kaj partio, dirante, ke komunistoj en Litovio estas enkarcerigi-


taj dum multaj jaroj. Li ekzempligis la estron de la iama komunista partio, kondamnita en januaro pro politika agado.

Ŝtata renverso

Laŭ la litova leĝaro, disvastigi, uzi aŭ montri flagojn aŭ aliajn simbolojn de nazia Germanio aŭ iama Sovetunio estas monpunotaj ĝis 300 eŭroj. Ekde 1991 la komunista partio en Litovio estas malpermesita, kiam partiestroj estis akuzitaj pri organizado de ŝtata renverso.

La parolo de la greka komunisto ofendis la litovan parlamentestron, kiu nomis la grekon „spirite blinda”, kaj diris, ke liaj vortoj favore al komunistoj ofendas la litovan popolon. Valinskas postulis, ke la prezidanto de la organizaĵo kaj delegitoj pardonpetu pro la vortoj de la greko, kvazaŭ en Litovio ne estus komunista okupacio kaj ĉiuj paroladoj pri krimoj de Stalin kaj viktimoj de komunismo estus nur fabeloj.

LAST



Greka delegito Konstantinos Alisandrakis, kadre de eŭropa kunlabora sesio, ne bone kunlaboris kun la litovaj kolegoj.

Finfine fiksite

Ratifis finfine la parlamentoj de Kosovo kaj Makedonio interkonsenton pri la komuna landlimo ĉirkaŭ 170 km longa. Jen la unua tia landlima traktato inter Kosovo kaj najbara lando. Ankoraŭ ne estas difinitaj la landlimoj kun Montenegro kaj Serbio. Tiu kun Albanio, tamen, estis fiksite, kiam ekekestis Jugoslavio.

Serbio daŭre konsideras la limojn administraciaj, ne ŝtataj. Montenegro antaŭ nelonge starigis tabulojn kun la devizo „Bonvenon al Montenegro” 500 metrojn ene de Kosovo, kio provokis protestojn de la popolo kaj de la registaro en Prištino.

Ekde 2002 ekzistas interkonsento inter Makedonio kaj Serbio, tute neglektanta la registaron de Kosovo, per kiu ĉi-lastata perdis ĉirkaŭ 2500 hektarojn apud la vilaĝo Dabelden. Tiel la domoj restas en Kosovo, la kampoj en Makedonio.

Dume Makedonio, agnoskinte la sendependecon de Kosovo, ankoraŭ ne establis kun ĝi diplomatajn rilatojn. Nun, ĉar la landlimo estas difinita, oni baldaŭ starigos ambasadejojn.

Bardhyl SELIMI



Kontribuojn pri la politiko de via lando sendu al politiko@monato.net.

UNESKO

Pinta virino

Elektita en oktobro estas virino kiel ĝenerala sekretario de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko). Irina Bukova, diplomato kaj politikisto bulgara, prezentis sin dum la 35a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo kiel produktaĵo de oriento kaj okcidento, kaj devenanta de lando, kie kunvivas kvar religioj, kaj de sistemo, kiu konis kaj komunismen kaj tutmondigon.

La festparolado de Bukova disvolviĝis en la franca, angla, hispana kaj rusa lingvoj. Tio venigis tondrajn aplaŭdojn, ĉar ĝenerale uzataj estas la

angla, malpli la franca (eĉ se Francio voĉdonigis, ke la Unesko-dungitoj en Parizo konu la du laborlingvojn, anglan kaj francan). Tamen neniam ĝis nun estis uzata la rusa ĉe tiu ĉi pinta nivelo.

Renovigi

Omaĝe al la antaŭa ĝenerala sekretario, Koïchiro Matsuura, venis laŭdoj el la tuta mondo pro lia rolo renovigi la UN-sistemon, atenti pri monda heredaĵo (materia, nemateria kaj subakva), kaj doni prioritaton al Afriko kaj al instruado de knabinoj.



La sidejo de Unesko prezentis en la ĉefa halo ekspoziciojn pri la diversaj fakoj kun prelegoj, invitoj de fakuloj, filmoj aŭ debatoj. Tiuj aranĝoj estis kvazaŭaj spiroj en ampleksa programo, kiam ambasadoroj, ministroj aŭ delegitoj de la landaj komisionoj diskutas pri antaŭdeciditaj rezolucioj. Cetere ili gravigas la rolon de la funkciuloj, kiuj laboras en la sekretariato, kaj kiuj englutas du trionojn de la buĝeto, dum restas nur triono por plenumi Unesko-programojn.

Renée TRIOLLE

LITOVIO

Flago-fiago



La prezidantoj de Litovio, Dalia Grybauskaitė, kaj de Francio, Nicolas Sarkozy, subskribas dokumenton sub inverse pendigita flago de Litovio.

Kiam en septembro la litova prezidanto, Dalia Grybauskaitė, vizitis Francion, renkontis ŝin la franca prezidanto Nicolas Sarkozy kun milita orkestro kaj honora gardantaro – kaj inverse pendigita ŝtata flago de Litovio.

En la salono, kie la prezidantoj subskribis dokumenton pri strategia partnereco, pendis flagoj de Francio, Eŭropa Unio kaj de Litovio. Tamen la litova – flava, verda, ruĝa – estis inversigita.

Tial kritikis litovaj parlamentanoj la ministron pri eksteraj aferoj, Vygaudas Ušackas. Ili volis scii, kiamaniere reagis la litova delegacio. En Litovio fuŝo tia estus konsiderata malsanktigo de la flago kaj estus severe punata (eĉ ĝis malliberigo). Klarigis Ušackas, ke okazis la konfuzo nek en Litovio nek en la ambasadejo, sed ĉe ĉambraro de Sarkozy. „Ni mem havis la eblon nek hisi la flagon, nek ĝin ŝanĝi. Francaj altranguloj jam pardonpetis”, diris la ministro.

LAST

Kuraĝa subskribo

La 4an de novembro 2009 estis subskribita interkonsento inter Slovenio kaj Kroatio, kiu finas preskaŭ 20-jaran disputon pri maraj limoj neniam fiksitaj inter unuopaj respublikoj de iama Jugoslavio.

Ne povinte interkonsenti, la du registaroj transdonis la problemon al arbitracia tribunalo starigita de Eŭropa Unio. Ambaŭ landoj akceptis la decidon de la tribunalo, kiu nun konsideru la neceson trovi por Slovenio manieron kontakti la internacian maron. Tamen ĝuste el tiu ĉi frazo fontas grandaj internaj problemoj en ambaŭ ŝtatoj.

Ekstremaj partioj kaj politikistoj en ambaŭ landoj proklamas respektive la kroatan registar-prezidantinon kaj la slovenan prezidanton perfidanto de sia lando. Tamen la frazo ne diras, ke Slovenio havos fizikan maran koridoron, por ke ĝiaj ŝipoj navigu al la bordo de Slovenio kaj ne traveturu fremdan maron. Tial Slovenio ne certas, pri kia markontakto temas.

Internacia juro

Ankaŭ kroatoj nervoziĝis. Laŭ internacia juro Kroatio verŝajne havus maran limon kun Italio kaj malebligis al Slovenio atingi internaciajn akvojn. Sed laŭ la nova interkonsento povas esti, ke la tribunalo decidus lasi al Slovenio koridoron inter Italio kaj Kroatio. Alivorte ĝi decidus, ke eble Kroatio ne havos rektan maran landlimon kun Italio.

La afero produktos ankoraŭ multajn kverelojn en ambaŭ landoj. Tamen ĝi estas historia momento. Laŭ la sveda prezidanto de la registaro, la subskribo „estas signo de politika kuraĝo”, ĉar la prezidantoj de Slovenio kaj Kroatio politike multon riskas.

Restas aliaj komplikaĵoj. Antaŭ ol Slovenio definitive ratifos la interkonsenton, tieaj dekstraj opoziciaj partioj minacas postuli referendumon pri la akcepto de Kroatio en Eŭropa Unio. Pro la marlima konflikto multaj slovenoj malŝatas kroatojn kaj la rezulto de referendumo tia estus tutcerte negativa.

Tamen la referendumo en Slovenio estas nur konsulta kaj ne devigas la parlamenton akcepti popolan postulon.

Reciprokaj rilatoj

Se fakte Slovenio ja blokus la kroatan eniron en EU, tio prokrastus ankaŭ la finan solvon de la landlima problemo. En la nuna interkonsento troviĝas frazo, ke la arbitracia tribunalo eklaboros nur kiam Kroatio jam estos membro de EU. Tio siavice daŭre malbonigadus la reciprokajn rilatojn inter la du ŝtatoj.

Tamen, malgraŭ kriadado kaj kvereloj, kiuj ankoraŭ kelkajn jarojn venenos la rilatojn inter la du landoj, la nuna interkonsento kondukos al definitiva solvo. Post du aŭ tri jaroj Kroatio iĝos EU-membro kaj kelkajn jarojn poste la arbitracia tribunalo decidus pri la aliro de Slovenio al la internacia maro. La decidoj ne ĉiujn kontentigos, sed fine ja estos fiksitaj la limoj – kaj ambaŭ landoj membris en EU.

Zlatko TIŠLIJAR



La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.

Mendu ĝin de
Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio,

butiko@fel.esperanto.be
aŭ www.retbutiko.net
kontraŭ 9,50 eŭroj +
afranko.

BRAZILIO

Kuranta kurento-krizo

Milionoj da brazilanoj spertis malheliĝon, kiam la 10an de novembro 2009 paneis la enlanda elektrosistemo. Trafis la sekva ĥaoso 18 el la 26 brazilaj ŝtatoj, tio estas 60 milionoj da homoj. Surprizis la malheliĝo aparte la vesperan dungitaron, ĝuste tiam elirantan al laborejoj.

La malheliĝon, kiu daŭris depende de la loko ĝis sep horoj, kaŭzis paneo en Itaipu, la plej granda hidroelektra centralo en la mondo. La centralo funkcias per la akvo de la rivero Paraná, kiu fluas eloriente-okcidenten en la suda regiono de Brazilo. Itaipu liveras kvaronon de la tuta elektro de Brazilo kaj preskaŭ la tutan elektron de Paragvajo, lando ankaŭ forte trafita de la paneo. Itaipu respondecas pri 12 600 MW da elektra energio pere de 18 generatoroj.

Kinejoj

Dum la malheliĝo brazilanoj spertis plurajn malagrablaĵojn. La polico de la urbo San-Paŭlo ricevis per telefono 2400 help-petojn dum la unua horo de la malheliĝo. En Rio-de-Ĵaneiro 10 000 gelernantoj subite restis sen lumo en klasĉambroj. En pluraj kinejoj spektantoj devis tranokti pro timo iri hejmen sen lumo. Aliaj homoj, kies sola lumo devenis de poŝtelefonoj, restadis dum horoj en liftoj ĝis la interveno de fajrobrigadistoj.

Inter la plej gravaj sekvoj de la ĥaoso ŝokis brazilanojn la mortigo de virino, kiu provis eviti rabiston. Laŭ la polico, ŝi decidis hejmen veturigi amikininon, ĉar busoj kaj trajnoj apenaŭ funkciis. Ĉe la enirejo de la konstruaĵo, kie loĝis la amikino, ili ekvidis rabiston kun armilo. La stiranta virino akcelis la aŭton kaj okazigis kolizion. La rabisto reagis per du pafoj kaj fuĝis. Li forprenis nenion krom la

vivon de la virino, kiu provis helpi sian amikininon.

Kafejoj

Tamen ne ĉiuj suferis pro manko de lumo. Furoris aĉetado de kandeloj, kio neniel rilatis al la oftaj brazilaj katolikaj festoj. Kaj, malgraŭ tio, ke kelkaj klientoj de kafejoj forkuris en la mallumo, ne paginte siajn fakturojn, raportis policestroj en la plej grandaj brazilaj urboj, ke ne plimultiĝis krimoj.

La brazila ministro pri minoj kaj energio Edison Lobão [édison lobaŭ] diris, ke kaŭzis la katastrofon malbona vetero en la regiono de la centralo. Tieaj fulmoj kapablis difekti delikatajn aparatojn. Tamen sen apartaj kialoj kelkaj opiniis, ke temas pri atako kontraŭ la komputila sistemo ĉe la centralo. Aliaj volis kredi je politika intereso, ĉar en 2010 finiĝos la mandato de prezidanto Lula. Ne mankis ŝerco, ke Itaipu estis tiam regata de Homer Simpson, la fuŝulo de usona animacia filmo.

Kapablo

Pli fideinde klarigis la krizon José Goldemberg [juzé góuldemberg], fizikisto, eksministro pri klerigado kaj eksrektoro de la Universitato de San-Paŭlo. Li diris, ke vespere la 10an de novembro la sistemo de Itaipu funkciis je maksimuma kurenta kapablo. Li atentigis pri troa centrado de la elektra energio de Brazilo en malmultaj stacioj.

Laŭ fakuloj, Brazilo havos sufiĉe da elektro por eviti similan problemon almenaŭ ĝis 2013. Tamen jam plurfoje en la pasinteco Brazilon trafis malheliĝoj. En 1999 pli ol 60 % de la lando restis horojn en mallumo. En 2001 kaj 2002 la registaro lanĉis ian ministrejon pri malheliĝo por administrati energian kri-



Furoris aĉetado de kandeloj, kio neniel rilatis al la oftaj brazilaj katolikaj festoj.

zon kaj solvi la problemon. Sed denove, en 2005 kaj en 2007, malheliĝo trafis pli ol tri milionojn da homoj en la ŝtatoj Rio-de-Ĵaneiro kaj Espírito-Santo.

Post la malheliĝo ne silentis la politika opozicio. Ĝi atentigis, ke statistikoj ĉiam favoras la prezidanton, kiu kun aŭ sen lumo tamen fariĝis la plej populara prezidanto de Brazilo. Kredeble, en iu malluma ĉambro kunsidis brazilaj opoziciuloj, diskutante, kiamaniere malŝalti la energion de la laborista respublikestro.

Jozefo LEJČ

ĈINIO

Piedetulinoj



Dum mia infaneco mia patrino diris al mi, ke mia avino estis piedetulino. Alivorte, laŭ tiama kutimo, ŝi havis tre malgrandajn piedojn.

Bedaŭrinde mia avino forpasis antaŭ mia naskiĝo kaj do mi neniam proprakule vidis ŝiajn piedetojn. Tamen antaŭ monato mi aĉetis aŭton kaj kun mia filineto vizitis 92-jaraĝan onklinon, kiu same estas piedetulino. Ŝiaj piedoj longas malpli ol 20 cm.

Antaŭ la establiĝo de la Ĉina Popola Respubliko tiamaj knabinoj devige haltigis la kreskadon de siaj piedoj. Ekde la 6-jara la piedoj estis vinditaj. Dum pli ol dumil jaroj en Ĉinio tiel suferis grandnombre knabinoj, kaj unu el tiuj estas mia onklino.

Oni ne bone komprenas la kialon. Supozeble oni kredis, ke knabinoj kun malgrandaj piedoj pli belas kaj pli facile



edziniĝas. Tamen la nova Ĉina Popola Respubliko tuj malpermesis la kutimon kaj tiel liberigis knabinojn de malfeliĉo.

Xu Jinming/pg

ALBANIO

Repatrujigu la patrinon ...

Revenigi la ostojn de Patrino Terezo al Albanio celis lastatempe la albana registaro. La bonfaranto naskiĝis kiel Agnes Gonxhe Bojaxhi en Skopjo (nun en Makedonio). En 1928 ŝi foriris al Irlando kaj fariĝis monaĥino. Ŝi mortis en 1997 en Barato kaj estas tie entombigita.

La albana reĝimo komunisma dum 45 jaroj malpermesis al ŝi viziti la landon, kie vivis kaj mortis ŝiaj familiaĵoj. Nur en 1989 ŝi vizitis Albanion, kiam la reĝimo klopodis prezenti al la mondo pli liberan impreson. Poste ŝi

plurfoje revenis kaj starigis en Albanio bonfarajn organizaĵojn.

Aŭtoritatoj en Barato negative respondis al la albana propono. Tamen Albanio ankoraŭ esperas konvinki Baraton pri siaj rajtoj. Cetere la albana registaro provas revenigi la ostojn de ĉirkaŭ 30 aliaj eminentuloj ekzilitaj de la komunisma reĝimo kaj eksterlande mortintaj. Ili inkluzivas eksan reĝon, Ahmet Zogu, kaj eksan ĉefministron, Theofan Stilian Noli.

Bardhyl SELIMI



Kolekti kraĵonojn

Mia kolekto de kraĵonoj ekestis antaŭ 20 jaroj. Tiam mi ankoraŭ frekventis lernejon kaj ofte bezonis kraĵonojn. Fojfoje mi aĉetis kraĵonon, kiu estis tre interesa kaj bela. Mi skribis per ĝi nur mallonge. Kiam mi devis pintigi ĝin, mi domaĝis ties belajn ornamaĵojn kaj kaŝis ĝin. Mi aĉetis novan kraĵonon, sed ankaŭ ĝi estis bela kaj mi aldonis ĝin al la unua kraĵono. La skatoleto, en kiu mi tenis la kraĵonojn, estis plena kaj mi havis nenion por skribi. Tiel estas ankaŭ hodiaŭ. Kiam mi aŭ miaj infanoj bezonas kraĵonon, mi devas aĉeti.

Longan tempon mi metis la kraĵonojn en la skatoleton. Kiam ili jam multis, mi devis decidi kiel klasifiki ilin. Oni faris por mi specialajn skatoletojn kaj mi klasifikis kraĵonojn laŭ landoj kaj fabrikoj. Mia hodiaŭa kolekto jam enhavas preskaŭ 5000 kraĵonojn kaj kolorkraĵonojn el 41 landoj de la kvin kontinentoj. El Afriko mi havas nur du.

Grandan parton mi aĉetis aŭ trovis helpe de anoncetoj. Multajn mi ricevis de familianoj, amikoj, kolektantoj. En

mia lando estas nur kvin kolektantoj, kiuj kiel mi membras en la ĉeĥa Klubo de kolektantoj de kuriozaĵoj (www.sberatel-ksk.cz). Multajn kraĵonojn al mi sendis esperantistoj korespondamiko precipe el malproksimaj landoj – Brazilo, Kolombio, Meksiko, Nov-Zelando, Usono ktp. Al ĉiuj mi tre dankas. En mia kolekto estas kraĵonoj historiaj, varbaj, nuntempaj, specialaj, pli kaj malpli longaj, kuriozaĵoj, kolorkraĵonoj, skatoletoj de kraĵonoj, protektiloj por pintoj de kraĵonoj, katalogoj ktp.

La plej malnova kraĵono devenas de la jaroj 1885-1914. Belega kaj tre malnova estas skatoleto kun inkokraĵonoj de firmao J. S. Staedtler el 1914-1918, destinitaj por la milita poŝto dum la unua mondmilito. Belaj estas la ĉeĥaj kraĵonoj el la intermilita epoko de firmaoj Grafo, Národní Podnik kaj L. C. Hardtmuth. Iuj, kvankam jam aĝas preskaŭ 70 jarojn, aspektas kiel ĵus produktitaj. La firmaoj Grafo kaj Národní Podnik jam ne ekzistas. L. C. Hardtmuth nuntempe nomiĝas Koh-i-Noor Hardtmuth kaj estas la plej gran-

da kraĵonfabriko en meza Eŭropo. El ĝi mi havas tre multe da kraĵonoj kaj krome mi pasintjare vizitis ĝin kune kun kolegoj kolektantoj.

La plej longa kraĵono estas el Rumanio – 50 cm, la plej mallongaj 3,8-centimetraj kraĵonetoj estas el Ĉinio. La plej mallongaj kolorkraĵonoj estas nur 5,8 cm longaj. Atentokaptaj kraĵonoj el Usono havas diversajn formojn, ekzemple de osto, arbo, koroj, dinosaŭro, vespereto, kleo ... Belaj kolorkraĵonoj, permane pentritaj kaj el ligno skulptitaj estas el Rusio. La tempon de baloj memorigas 8 cm longa kraĵoneto por dancordo-enskrivo, kun belega invitkarto al balo en 1913. En la kolekto mi havas ankaŭ lignajn tabuletojn por produktado de kraĵonoj. En mia kolekto la vidindaj kraĵonoj estas tre multaj. Iujn oni povas spekti sur fotoj. Mi jam havis kelkajn ekspoziciojn kaj ankaŭ ricevis de la Klubo de kolektantoj de kuriozaĵoj diplomon por „Vidinda kolekto de kraĵonoj kaj kolorkraĵonoj”.

Gabriela HROCHOVA

LIĤTENŝTEJNO

Kion viziti post-tagmeze?

Grandeco relativas. LiĤtenŝtejno certe apartenas al la ŝtatoj teritorie ne tro grandaj, sed aserti, ke kelkaj horoj sufiĉas vidi la tieajn vidindaĵojn, estas starpunkto de rapid-turistoj. Se oni tranoktus ekzemple en bregenca hotelo, ne restas multa tempo por la celo, kiu situas 100 kilometrojn for. Cetere, la lando apartenas al la plej riĉaj en la mondo, almenaŭ post la dua mondmilito.

La fortika kastelo, situanta sur loko alte super la apudreja ebenaĵo, dominas la landon kvazaŭ lumturo. Sciencistoj tamen neas, ke la landa nomo devenus de la popola etimologio luma ŝtono = Li(e)cht(en)stein [liĤtenŝtajn].

La historie konservita e-vokalo en la skriba formo germane Li(e)chtenstein mankas en la nomo de kastelo Lichtenstein [liĤtenŝtajn], tronanta same sur hela roko. Ĝi troviĝas en la germana federacia lando Badeno-Virtembergo. Ĝi estis la kastelo de la duko de Urach, kiu tamen ne povis konservi la sendependon de sia lando post Napoleono, kiel sukcesis la dinastio de princa familio LiĤtenŝtejno. Cetere, tiu kastelo fariĝis fama pro sia rolo en la samnoma historia romano de romantikulo Vilhelmo Hauff.

Do, LiĤtenŝtejno, sendependa ŝtato inter Aŭstrio kaj Svislando, kaj Lichtenstein, kastelo sudokcidente de Reut-

lingen (Germanio) similas nur laŭnome. Tamen oni iel povas kompreni, ke foto de la germana kastelo akompanas artikolan tekston pri la alpa ŝtato (MONATO 2008/11, p. 20). Por senkolerigi la liĤtenŝtajnanojn kaj iom komplezi la legantojn de MONATO apude videblas la vera kastelo de LiĤtenŝtejno, situanta alte super la administra centro Vaduzo. Por atingi piede la fortikaĵon, hodiaŭ loĝejon de la princa familio (kiun ne povas viziti nur duontagaj turistoj), oni bezonas jam unu el la malmultaj horoj, kiuj laŭdire sufiĉas por trarigardi la landajn vidindaĵojn ...

Franz-Georg RÖSSLER



STARDÉD

La kastelo Lichtenstein troviĝas en la germana federacia lando Badeno-Virtembergo.



REBECCA AND BERNARD

La vera kastelo de LiĤtenŝtejno, situanta alte super la administra centro Vaduzo.



REBECCA AND BERNARD

Respektinda virino. Granda animo – ĉu iom naiva?

Se fotojn oni vidas pri Lidia Zamenhof, ĝene povas malhelpi nin bone rigardi la tiama modo: virinon ni vidas en ege eksmodaj vestaĵoj – kiuj ja supozeble estis tre laŭmodaj tiu-tempe. Ĉar se io certas, tiam ja, ke Lidia Zamenhof staris firme en sia propra epoko; ŝi ne estis „eksmoda”. Ŝi vidis la minacojn, sed ŝi ankaŭ vidis multajn eblojn por strebi al bono. Ŝi vivis en fido al Dio, kies signojn kaj mesaĝojn ŝi kredis trovi en la revelacioj de Bahaismo.

La volumo estas kompilaĵo de ĉiuj ĉi-momente konataj originalaj tekstoj de la plej juna filino de L. L. Zamenhof: eseoj, artikoloj, paroladoj en kunvenoj kaj antaŭ radiomikrofonoj, kaj rakontoj. En la dua parto troviĝas la retrovitaj leteroj.

Leteroj kaj recenzoj

Jam en 1980 – same en Antverpeno, sed ĉe TK/Stafeto – aperis de Isaj Dratwer la kompilaĵo *Lidja Zamenhof: vivo kaj agado*. En ĝi krom mallonga en-




konduko kaj kelkaj fotoj la ĉefan rolon havas pluraj leteroj – fotokopie kaj preslitere. Siatempo mi recenzis ĝin. Laŭ mia memoro: iom strange estas, ke la erara redono *Contona* (p. 32 ĉe Dratwer) de la manskribita *bontona* (p. 33 samlibre – oni do mislegis ŝajne la minusklan *b* kiel majusklan *C*), pri kiu sia-tempe mi atentigis, ne estas ĝustigita. Oni bonvolu do en p. 302 de la nova verko ĝustigi tion en la antaŭlasta linio.

La leteroj, kiuj restas de Lidia, ĉefe temas pri renkontiĝoj kun konatoj, pri Ĉekursoj, kiujn ŝi donis, pri prelegoj en bahaaj kunvenoj ktp. Estas bone konservi tiujn atestaĵojn de ŝia vivo – eĉ se enhave fojfoje ili estas sufiĉe simplaj.

En la nuna libro kelkfoje okazis bedaŭrinda komputila ŝovo de linioj al sekva paĝo. La unuaj du linioj de p. 323 troviĝas tute sube je p. 322; la 3 lastaj linioj de p. 325 troveblas je p. 326 supre.

Pli interesa supozeble por la ĝenerala publiko estas la unua parto de la libro





Viva junulino

Kiel ajn oni aliras ĉi tiun libron, ĉu kiel historiisto, kiu deziras plireliefi la historion de la leginda libro de Wendy Heller – *Lidia, la vivo de la Lidia Zamenhof; filino de Esperanto*, ĉu kiel simpla esperantisto scivola pri tiu filino de Zamenhof, ĉu kiel intereso pri la frua bahaa historio – kiel ajn: ĉi libro montras ege vivan junulinon, kiu vidis la kreskantajn minacojn de naziismo kaj milita perforto, kiu samtempe plu fidis je pozitivaj fortoj – fortoj de Dio kaj fortoj de homa fidelo – kaj kiu ĝis sia morto plu strebis al la bono. Tamen, kiam fine ŝi reiras hejmen meze de la minacoj, oni tamen emas demandi sin, ĉu iel ankaŭ

ŝi eble estis iom naiva, ne povante kredi je tioma malbono de naziismo. Sed mi kredas, ke tiun subtaksadon de la malbonaj fortoj povus fari preskaŭ ĉiu.

Lidia poluris sian lingvuzadon ĝis alta nivelo. Estas bone kompreneble, ke dumlonge ŝi estis kvazaŭ unika reprezentantino de Esperanto, kiel vojaĝanta instruistino, kiu logis amasojn al siaj kursoj.

Dankon al la kompilintoj por la konservado de ĉi memoroj!

Gerrit BERVELING

Lidia Zamenhof: *Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj*. Kompilis J. Amoureux, Z. Banet-Fornalowa, M. Higasida, B. Westerhoff. Antaŭparolo de L.C. Zaleski-Zamenhof. Eld. FEL, Antverpeno, 2008. 429 paĝoj. ISBN 9789077066386.

Prezo ĉe FEL de la bindita versio: 24 eŭroj + afranko; de la elektronika versio: 14,40 eŭroj.

– paĝoj 29-297. Jen ŝi donas tute modelan recenzon – p. 84-92 – pri *Sinjoro Tadeo*, p. 174-183 pri *Plena Gramatiko* de Kalocsay-Waringhien; jen kortuŝas nin tute senpretenda memoraĵo pri rompita paperpremilo el la gepatra domo – p. 105-106; jen trafas la priskriboj pri kreskantaj zorgoj pri la malproksima patrujo Pollando – p. 121-123: „kapti la eĥojn el fora Polujo”; jen estas klara pledo kontraŭ tro da neologismoj, pledo por multaj tre rekonebla ankoraŭ – p. 124-125. En pluraj tekstoj oni kvazaŭ travidas la animon mem, kiun nutras la bahaa fido: sur p. 161, ekzemple, ŝi provas klarigi, ke laŭ ŝia kompreno vere konkrete ekzistanta malbono tutsimple ne ekzistas: ekzistas nur „manko de bono” (la saman doktrinon oni konas ĉe Aŭgusteno). Kelkfoje ŝi regalias nin per ŝajne simpla fabelo – pri Hom’ kaj lia ombro – p. 242-246.



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe [fel-monato](https://www.fel-monato.net)
www.retbutiko.net.

Brila perloĉeno


Mi ne hezitas konfesi, ke al kontakto kun Borges mi alvenis ege malfrue. Li estis jam fama, kiam mi estis lerneano, sed tiutempe apenaŭ en la italaj lernejoj oni studis ion pri fremdaj literaturoj, krom pri tiu de la lingvo, kiun oni studis kiel devigan, kaj por mi ĝi ne estis la hispana. Al Borges mi aliris multe pli poste per legado tra esperantaj tradukoj, kaj ioman konatiĝon mi ekhavis per eseoj, aperintaj ĉefe en *Literatura Foiro* kaj *Fonto*; relative freŝdate aperis tradukoj en la reto. Tial mi ne surpriziĝis, ke la atenta legado de tiu ĉi antologio malfermis al mi mondon: la mondon de la fikcio de Borges, kie interplektiĝas kanvasoj, baziĝantaj sur rafinitaj referencoj klarecaj, kie renkontiĝas speguloj, ŝakoj, labirintoj. Borges nin sorĉas ĉefe per la fantasto de siaj noveloj, sed ankaŭ liaj poeziaĵoj, kaj en lia plej frua, kaj en lia dua periodo, estas trempitaj en fantasto, kvankam ĉiam kroĉita al realaj, plejparte personaj eventoj, kiel la blindiĝo aŭ la „ama sindediĉo al libroj”, kiel diras la mallonga antaŭparolo de Jorge Camacho.

Strangaj aventuroj

Pri Borges mem ne necesas paroli ĉi tie. Ĉiu literaturhistoria teksto abunde raportas pri ĉi tiu argentina verkisto, naskiĝinta en 1899 kaj vivinta dum kelke da junulaj jaroj en Svislando kaj en Hispanio. Kelkaj rakontoj el la recenzata kolekto venas el lia plej fama kolekto *Ficciones*, aperinta hispanlingve en 1944 kaj en la dua pliampleksigita

eldono en 1956: en *Tlön, Uqbar, Orbis Tertius* imagata planedo estas prezentata kiel reala, kaj miksiĝas realaj kaj fikciaj situacioj; en *La biblioteko de Babelo* la universo estas rigardata kiel nepenetrebla senfinaĵo; en *La loterio en Babilono* la homa destino estas prezentata kiel rezulto de hazardo, laŭ leĝoj nedeĉifreblaj;

en *Funes, la memoroza* kamparano, sekve de akcidento, akiras potencegan memorkapablon kaj mortas, subpremante de tiom giganta kaj senfina memoro, kiu en ĉiu momento vekas sennombran aron da pliaj memoraĵoj. *La sekreta miraklo*, novelo, kiu donas la titolon al la tuta kolekto, rakontas pri mortkondamnita lite-



raturisto, kiu vivas unu plenan jaron en sia menso la etan momenton inter la ekzekuta komando pri pafado kaj la morto efektiva. Kiun sencon havas la mondo? Fikcio iĝas ŝlosilo, se ne por kompreni la mondon, almenaŭ por sin demandi pri ĝi. Plej multaj el la rakontoj estas rakontoj pri homoj, havintaj strangan aventuron, en milito, antaŭ morto, per akcidento, kie fikcio kaj realo tiom miksiĝas, ke ne distingeblas unu de la alia.

La longo de la noveloj estas varia, de duona paĝo al pli ol dek; se la duatipaj trenas la leganton malrapide en fantastan mondon, linion post linio, ne malpli trafaj estas la tute mallongaj: la dudek du linioj de *La du reĝoj kaj la labirintoj* enhavas tiom da filozofio (da saĝa filozofio!), kiom rakonto dudekoble pli longa. Paralelon oni povus trovi en la ezopa fabelo *La vulpo kaj la cikonio*, sed la transpono el la helena medio en la medion de Babilonio kun Alaho, reĝoj, armeoj kaj militoj estas vere majstra. La poezia parto ampleksas okonon de la tuta libro.

Densa je signifo

Grandan intereson Borges havas al la lingvo, tiel ke ĉiu lia vorto estas densa je signifo; interesa estas ankaŭ lia eseeto pri la analiza lingvo de Wilkins, unu el la sennombraj provoj krei lingvon laŭ klasifiko de la konceptoj kaj ilia subdivido laŭ klasoj. Wilkins estas nun forgesita, kaj lia nomo apenaŭ troviĝas en la fakaj libroj pri planlingvoj; sed Borges kaptas la okazon por esprimi sian koncepton pri la esenco de lingvo.

Interesa aldono en la libro estas la listo de la jam aperintaj verkoj de Borges. Kelkaj el ili estas enprenitaj en ĉi tiun libron; de aliaj pecoj jam tradukitaj aperas ĉi tie nova traduko; aliaj estas vere komplete novaj: materialo por la kono pri Borges estas nun konsiderinde pli disponebla.

Legado de Borges ne estas facila, kaj lia klereco, tiel larĝamane distribuita tra ĉiuj liaj verkoj, ne malofte estis juĝata kiel sinmontra parademo. Eĉ ordinare klera homo bezonas, tamen, ĉiam kon-

sulti la (abundajn) librofinajn notojn por kompreni aludojn al personoj, mitoj, historiaj eventoj, religiaj kredoj, literaturaj verkoj. Sed tiun penon leganto povas ŝpari, kondiĉe ke li konsideru nekonatan de li nomon kiel fikciaĵon: ne nepras, ke ĝi havu historian kunligon; la arto de Borges funkcias same fascine. Tradukado iĝas do defia, kaj la teamo de dek unu tradukintoj, gvidata de la redaktoro kaj kompilinto István Ertl, plene sukcesis. Rimarkinde, ke nur kvin el ili estas origine hispanlingvanoj; la aliaj estas po unu polo, hungaro, eŭsko, brito, portugalo kaj italo, la lasta el kiuj (Giulio Cappa) tradukis plej multon. Evidente Borges sorĉis spiritojn tre malsimildevenajn, kio konfirmas lian tutmondecon.

Carlo MINNAJA

Jorge Luis Borges: *La sekreta miraklo*. Kaliningrado, Sezonoj, 2008, 200 broŝuritaj paĝoj.

Prezo ĉe FEL: 19,08 eŭroj + afranko.



Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. www.retbutiko.net retbutiko@fel.esperanto.be Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko

La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Ventreĵio, dua raldoniĝu

„**N**eniu povas trompi Dion, ĉar li scias ĉion. Kiu havas pli ol dek milionojn en la banko, sed donas nur mil frankojn kiel dekonajon, tiu trompas Dion, kaj tiun

Dio severe punos”, kriis pastoro dum elsendo ĉe radiostacio. Nun en Togolando, ĉiutage el radioriceviloj eliras buntaj predikoj. La eklezioj kristanaj estas multaj. Eble oni ŝatus scii kelkajn

nomojn: Jesuo estas vivanta, Ministerio por Rapida Interveno de Jesuo, Lumo de Kristo, Amikoj de Jesuo, Torĉo de Kristo, Eklezio Baptista de Beno, Asembleoj de Dio, Ĉiela Kristanismo, Apud Ciono, Kerubo-Serafo ktp. La nomoj tiom multas, ke eĉ plurmil-paĝa kajero ne povas enteni ilin. Certe tiom estas ankaŭ la pastoroj. Ne mankas pastroj en Togolando, kaj ankaŭ imamoj havas sian lokon. Tute klaras, ke la religia kampo de Togolando estas bunta.

Antaŭ la alveno de la koloniantoj al Afriko, ĝiaj anoj havis sian religion. Afrikanoj tiam adoris la naturon kun ĝiaj enhavaĵoj. Ili tiel diigis ŝtonojn, arbojn, bestojn, lagojn, riverojn, tondron ktp. Tiu adorado plu ekzistas, sed la importitaj religioj reduktas ĝian adeptaron, ĉar multaj afrikanoj forlasas la gepatran kredon por brakumi alian, kiu, laŭ ili, kondukas al la eterna feliĉo post la morto.

Abundas la religietoj

La unuaj religioj estis katolikismo, protestantismo kaj islamo. Tiujn tri religiojn praktikadis togolandanoj, ĉar ili estis rekonitaj de la ŝtato. Kvankam intertempe ekzistis ankaŭ aliaj religioj kristanaj, tiuj ĉi estis malpermesitaj en Togolando antaŭ 1990, kiam ekblovis pli demokratia vento tra la mondo. Ĝi certe atingis ankaŭ Togolandon kun siaj sekvoj bonaj aŭ malbonaj. Unu el tiuj sekvoj estas la multiĝo de religioj, plej trafe religietoj kristanaj. En la areno de la grandaj religioj, tiujn religietojn oni nomas sektoj. Ili nun vere abundas en Togolando kun la diversaj nomoj kaj



Antaŭ la alveno de la koloniantoj al Afriko, ĝiaj anoj havis sian religion. Afrikanoj tiam adoris la naturon kun ĝiaj enhavaĵoj.

THE MAN WITH SALT HAIR

THE MAN WITH SALT HAIR

praktikoj.

La plimulto de la pastoroj ne estas tiel kleraj kiel la pastroj en katolikismo, pastoroj en protestantismo kaj imamoj en islamo. En tiuj ĉi religioj neniu rajtas doni mem al si tiun titolon. Tiel okazas ankaŭ en aliaj religioj kiel Diaj Asembleoj, Pentekosta Eklezio kaj Atestantoj de Jehovo. Tiuj ĉi kredogrupoj estas tiel organizitaj, ke regas en ili vera hierarkio kun centra administrado en ĉefa sidejo. Male, kredogrupoj kiel Jesuo Vivanta, Torĉo de Jesuo, Ministerio de Rapida Interveno de Jesuo ktp estas starigataj de homoj, kiuj donas al si mem la titolon pastoro. Ĉar estas multaj pastoroj, jen aliaj fondintoj de tiaj grupoj nomas sin *apôtre* (apostolo, francelingve). Aliaj titoloj estas *bishop* (episkopo, angle), *reverend* (moŝta pastro, angle). Ankaŭ la titoloj estas multaj, ĉar ĉiu elpensas tion, kio plaĉas al li. Iu pastoro ĵus ŝanĝis sian titolon al doktoro-profesoro. Li klarigis, ke la pastoroj tiom malbone kondukas, ke li hontas porti tiun titolon, ĉar oni konsideros ankaŭ lin tia pastoro. Nun ekzistas multaj tiaj *bishop* kaj pro tiu ĉi angla esprimo ŝajnas, ke Dio parolas pli la anglan ol la aliajn lingvojn.

Tamtamoj kaj tamburoj

Kvankam ĉiutage la preĝejo bruas pro predikoj, dimanĉo estas la plej sonorigata tago en la lando. Tondradas muzikiloj modernaj, ankaŭ tamtamoj kaj tamburoj; ne silentas gongoj kaj kastanjetoj, kaj la kantoj, prefere kantejoj, inundas la kvartalojn. Enmiksiĝo de paroloj okazas ofte. Unue estas la vico de la altranga homo de la eklezio (pastoro, *bishop*, apostolo ktp) paroli en la lingvo de Dio, la angla. Sekvas traduko al la nacia lingvo kaj/aŭ al la franca. En kelkaj eklezioj oni parolas ankaŭ la francan kun traduko al la nacia lingvo. Ĉio okazas kvazaŭ Dio paroligas la pastorojn en fremda lingvo. La plimulto de la pastoroj scipovas la nacian lingvon, sed dum la prediko ili parolas la dian lingvon. Kiam ekzemple la interpretanto ne bone tradukas, tiam la pastoro mem

parolas la nacian lingvon por diri ĝuste, kion li volas, antaŭ ol daŭrigi en la lingvo de Dio. Okazas tiel ankaŭ, kiam la traduko de la angla al la franca ne taŭgas por la pastoro. Poliglotoj estas la pastoroj, ĉu ne?

Angla, la lingvo de Dio

Multaj el la pastoroj de la „sektoj” estas niĝerianoj aŭ ganaanoj. Togolandanoj lernas la metion de pastoro de ili kaj poste starigas propran atelieron, preĝejon, kaj donas nomon al la eklezio, ekzemple, Kapelo de la Ĉiopova. La plimulto de tiuj ĉi pastoroj havas malaltan klercon, sed tamen predikas en lingvo de Dio, precipe en la angla. Kiu bone scipovas la veran anglan, tiu tuj rimarkas, ke la angla de multaj el tiuj pastoroj estas tute speciala: temas pri komponaĵo el vortoj francelingvaj kaj anglalingvaj, kaj ofte kun enŝovo de nacilingvaĵoj. Kiu nomas la lingvon „frangla” (fran(ca + an)gla), tiu iel pravas, ĉar estas malfacile al scipovanto de la franca aŭ de la angla ĉion kompreni. Tiu lingvo de Dio tiom respektindigas la pastoron, ke la adeptoj lin diigas. La pastoro estas ĉio, kaj laboras por la adeptoj. Tial tiuj ĉi zorgu pri liaj bezonoj: manĝado, loĝado, vestado ktp. Sed la pastoro devas multe lukti por havi multe da adeptoj. Ju pli da adeptoj, des pli da lukro (dekonaĵo). Ĉu pastorado estas komerco?

„Ho, ĉu tiu ĉi homo estas la pastoro? La pasintan semajnon, li vizitadis mian patron, ke li faru al li amuleton, ke liaj aferoj sukcesu. Ĉar mia patro estas ĉarlatano kaj havas multajn voduojn, li donadis al li multe da aferoj, ke li havos multe da klientoj. La homo ĉiam revenas kontenta por diri al mia patro, ke ĉio sukcesas. Ĉu la amuleton li faris por ke sukcesu lia eklezio?” Kiu trompas? Ĉu la pastoro aŭ la adeptoj? „Iom da ĉarlatanaĵo kaj iom da diaĵo”, diras multaj. Certe oni celas ion irante al la preĝejo. Sendube ion celas ankaŭ la pastoro por fondi sian eklezion. Se li havas multe da adeptoj, certe tiuj ĉi estas

kontentaj pri liaj servoj. Do la pastoro tute ne kulpas uzi ĉiajn rimedojn por kontentigi siajn adeptojn kaj samtempe sin mem. Sed, kio gravas, tio estas, ke oni sciu, kion oni vere volas, kredante je Dio.

Hipokrituloj

Multaj adeptoj, kiel ankaŭ la pastoroj estas hipokrituloj. Dum ili serĉas ion alian, ili montras Dian kredon, kiel sian celon. Kiel adeptoj povas cirkuli tra multaj preĝejoj por trovi la taŭgan? Kial iuj pastoroj kalumnias la aliajn, reklamante sian eklezion? Kial pastoroj frostigas la rilaton kun adeptoj, kiuj ne plu kapablas doni multe da dekonaĵo? Kial pastoro malkonsilas al virino edziniĝi al alia pastoro, kaj li mem havas nun la virinon kiel edzinon? Ĉu tio estas en la ordonoj de Dio? Tiajn aferojn oni vidas ĉe la praktikantoj de la religioj de la prauloj afrikaj, sed vere kun multe da diferenco. Estas granda solidareco inter la adeptoj kaj estroj de voduoj. Neniu kalumnias la alian. Kiam estas ceremonio ĉe voduestro, li invitas la aliajn, kaj kune ili faras la voduservon. Se la pastoroj kaj iliaj adeptoj povus imiti voduishtojn tiutere, oni pli bone komprenus ilin. Kredogrupoj kreskas kiel fungoj kaj ĉie estas preskaŭ sama konduto: la pastoro faras ĉion por riĉiĝi. Ili eĉ trompas eksterlandajn pastorojn riĉajn kaj rabas de ili monon. Por atingi tion, ili starigas projektojn multcelajn centritajn sur servado al Dio. Kial la ventro povas igi la homojn meti Dion antaŭ ĉio? Necese estas trovi taŭgan nomon por tiaj grupoj.

„Vi estas ventropastoro. Kial do vi fondas propran eklezion, forlasante la unuan? Certe por ricevi de mi la dekonaĵon, kaj uzi ĝin kiel vi volas, ĉu ne?” admonis pastoro alian. Se pastro povis nomi alian ventropastro, kial ankaŭ la religietoj, kiujn ili fondas dise tra la lando ne havu tian nomon? Certe taŭgas la nomo ventreligio kun aldono de la manka r por havi ventrreligion.

GBEGLO Koffi

Trancporto

Konfuzite li metis la libron apud sin. La kovrilo montris malhelajn makulojn, kie liaj humidaj fingroj ĵus tenis ĝin. Lia gorĝo male sentiĝis seka kiel korko kaj lia lango similis al sekiĝinta limako, kiu kun ĉiu movo algluiĝis al dento, retirebla nur kun dolorpiko. Estis, kvazaŭ ĉiu likvo el lia buŝo migrus al liaj manoj, kie ĝi eliris el la poroj. Tiel devus senti sin drogulo, kiu bezonas sian bonfartigan substancon.

Kramfa li sidis tie, rigardis iom ĉirkaŭ si, sed lia kapo estis febreca: ĉiuj okulmovoj doloris, kaj ĉio, kion li vidis, atingis lin nur guton post gutu. Lia cerbo malrapide ekfunkciis denove, kiel frostiĝinta rapidumaro, kiu devis ankoraŭ varmiĝi.

Li rigardis tra la fenestro eksteren kaj estis, kvazaŭ la bildo devus trakuri kilometrojn longajn nervofibrojn ĝis lia

cerbo, kie la fragmentigitaj impulsoj unu post alia denove devis rekombiniĝi en bildon.

Intertempe li provis denove supligi siajn kramfajn membrojn. La gamboj dolorjuketis kvazaŭ miloj da formikoj diskurus interne. Li turnis siajn rigidajn maleolojn, pene movis siajn nefleksiĝemajn fingrojn ferme-malferme. Kiom longe li sidis en ĉi metra trajno? Kiom ofte li travojaĝis la urbon? Kiom da homoj sidis apud li kaj poste foriris? Neniu alparolis lin. Ĉu neniu rimarkis ion strangan? Aŭ ĉu tamen ili diris ion, sed li ne aŭdis? Tamen, li ja ne estis surda; sed nun kiam li ekatenis la metro-bruojn, ili pli kaj pli laŭte atingis lin. La bruske malfermiĝantaj kaj refermiĝantaj pordoj, la grincantaj radoj, la parolantaj homoj, sonanta poŝtelefono ...

La bruoj komencis invadi lin, kvazaŭ ĉirkaŭita de pafadantaj mitraloj meze de milito. Li sopiris oksigenon, instinkte palp-prenis sian tekton – ĝi ankoraŭ estis tie – kaj ekstaris, sed tuj perdis sian ekvilibron kaj falis kontraŭ pasaĝeron fronte de li. Per milda puŝo li refalis sur sian antaŭan sidlokon. Humile li provis pardonpeti, sed lia lango ŝajnis inversigi ĉiujn movojn. Lia kapo vertiĝis kaj li eksentis naŭziĝon. Aero!! Kiam la trajno denove atingis haltejon, li stumblis ĝis la pordo kiel profesia ebriulo kaj zigzagis al la benkoj sur la kajo. Estis tre strange, ke ĥimeroj ŝvebe moviĝis tien kaj reen; fojfoje ili eĉ disdubiĝis, ŝvebe disiĝis kaj reunuiĝis. Li frotis la dolorajn okulojn kaj skuis la kapon. La vido fariĝis iom pli klara, sed li tuj bedaŭris la kapskupon: pingloj traboris lian kranion kaj ĉiuj postlasis malrapide forirantajn dolorspu-



Li rigardis tra la fenestro eksteren kaj estis, kvazaŭ la bildo devus trakuri kilometrojn longajn nervofibrojn ĝis lia cerbo...

rojn, kiel sketantoj, kiuj noĉas glacieron, kiu iom poste denove fermfroŝtiĝas.

La salivo revenis en lian buŝon, sed havis la amaran guston de galo. Kio do okazis? Hieraaŭvespere li ne diboĉis, ĝustatempe enlitiĝis, neniam da alkoholo, nek drogo, eĉ ne mariĥuano; tion li ne faris dum jaroj. Ĉu li manĝis ion malbonan? Ne estas iu cerba aŭ kora paneo, infarkto, ĉu? Nu, je lia aĝo de 37 jaroj estas iom malverŝajne! Lia koro ja batis malregule, sed ne estis doloro en lia brusto. Li ekdormis ne tro malfrue, ellitiĝis pro la vekhorloĝo, duŝis sin, manĝis porcion da muslio kaj promenis al la metrostacio. Je la oka kaj duono. En la metroo li estis trovinta libron.

Subite io teruris lin: lia gorgo fariĝis sable sekega, liaj manoj malsekaj, lia ventro ŝajnis ensuĉi lian tutan vivon, kiu en lia stomako grandiĝis kvazaŭ pilko. Li kurbiĝis, lia rigardo kaj aŭdo svagiĝis kiel ekrano kaj mikrofono, de kiuj la kabloj tiriĝis el la kontaktingo. Io paralizis lian cerboaktivecon.

Laŭgrade liaj sentumoj revenis kaj li ĉirkaŭ si palpserĉis la libron, sed ĝi restis en la metroo. Fulmo trairis lian ventron kvazaŭ li perdis sian monujon

aŭ ion alian valoran. Serĉi la libron nun ne havus sencon, li verŝajne ne retrovus ĝin. Ĉiuokaze ĝi ne apartenis al li.

Sed li devis iri al sia laborejo. Lia laboro! Ektimigita li rigardis sian horloĝon. La dua kaj duono. La dua kaj duono!! Jam dum horoj li devintus esti en sia oficejo! Kiel li klarigu ĉion ĉi? ... aŭ ĉu prefere li vizitu kuraciston? Sendube! Eble li havis narkolepsio-atakon. Sed ĉu tio tiel naŭzas kaj vertiĝigas vin? Ĉiuokaze li bezonus kuracistan atestilon por sia laborejo.

Ĉi-foje li pli singardeme ekstaris. Li atentis sian vidon; sufiĉe normala. Liaj gamboj sentiĝis iom feblaj, sed ili portus lin. Kvazaŭ maljunulo li trenpaŝis al la rulŝuparo, kiu pro lia nuna stato tro rapide antaŭeniris, sed kiu lin tamen sekure demetis sur la teron. Nun estis la sunradioj, kiuj traboris lian kranion kaj torturis liajn nervojn. Li ŝirmis la okulojn per la brako kaj devis denove eksidi. Iu demandis lin, ĉu ĉio estis en ordo, sed al li tiel mankis energio, ke li eĉ ne kapablis reagi. Kun multe da peno li sukcesis kapsigni, tiel ke la alia foriru kaj li povu denove koncentriĝi pri si mem. Li sidis kun la genuoj kunfalditaj, apogantaj la

kubutojn, kaj la manoj tenis lian kapon. Li memoris kiom ofte li tiel sidis dum sia studenta epoko por resobriĝi. Sed ĉi-foje la alkoholo ne ludis rolon, li ankaŭ ne uzis medikamentojn, manĝis nenion suspektindan kiel ostrojn aŭ ion alian, kies konsilinda konsumdato jam pasis.

La libro denove surfaciĝis en lia penso, sed nun li pli bone regis sin. Li eĉ sukcesis rektigi sin, kvankam ne sen apogo je la mureto apud la rulŝuparo.

Li povis – kaj tio estis senpeziĝo – denove pensi sufiĉe klare, sed certa nebulo restis en lia kapo, nebulo, kiu malhelpis lin agi rapide kaj efike; ankaŭ lia korpo ankoraŭ ne estis en ordo, sed jam funkciis pli bone.

Kuracisto. Sed kie mi estas? Li ne tre bone konis tiun ĉi kvartalon. Kiu strato estis ĉi tie? Mi serĉu. Ĉu eble tamen pluiri per la metroo? Jam nur la ideo ribeligis lian korpon: ondo de naŭzo trairis lian korpon, sed feliĉe denove foriris. Tiam do surtere ... Piede. Li ja sciis proksimume kie li troviĝas kaj kiun direkton iri, sed promenado daŭrus minimume duonhoron, eĉ se li nenie vojerarus.

Eble daŭrus tamen pli ol duonhoron. Tiam per taksio estus pli bone.



Laŭgrade liaj sentumoj revenis kaj li ĉirkaŭ si palpserĉis la libron, sed ĝi restis en la metroo.

Kaj sendube pli sekure. Kiu scias, ĉu li remalsaniĝos? Dum li ĉirkaŭrigardis por trovi taksion, lia cerbo daŭre serĉis klarigon por lia situacio. Troa laboro? Ne vere. Almenaŭ ne pli ol kutime. Ankaŭ hejme ĉio estas en ordo. Denove li pensis pri la libro. Io stranga estis pri ĝi. Sed tiam li vidis liberan taksion kaj singarde aliris ĝin.

„Al la plej proksima hospitalo, mi petas.”

„En ordo.” Kaj iom poste: „Ĉu ĉio bonas?”

„Jes ja.”

Li trovis la aŭtoveturon iom sufoka, sed li sukcesis bone teni sin. Ankaŭ la tipa hospitalodoro ne estis pli bona, sed li sciis, ke li eltenos. Ĉi tie li estos en bonaj manoj.

Sed kiam li finfine povos eniri la kabineton, la kuracisto sendube nenion trovos. Eble li mallonge aŭskultos lian

koron, kompreneme kaj afable kapsignos kaj preskribos tagon da ripozo. Kaj jen, kostos 30 eŭrojn. Revenu, kiam vi fartos malbone denove. Kaj fine: „La sekvantan!”

Sed li sciis, ke io estas ne en ordo, io estas ne normala. Iu penso vivis fone en lia kapo kaj de tempo al tempo venis pli proksime al la surfaco, sed ĉiufoje, kiam li provis kompreni, denove forglitis kiel peco de sapo en bankuvo.

Li prenis revuon de stako, foliumis iomete, sed rapide remetis ĝin. La malkomforta sento revenis de lia ventro supren kaj krome lia kapo fariĝis obtuza.

„La sekvanta!” Finfine estis lia vico.

„Eksidu do. Kio estas la problemoj?”

Du afablaj, tipe kuracistaj okuloj alrigardis lin, atendis kuraĝige, kion li diros. Sed kiel diable li rakontu ion, kion li mem ne povis kompreni? Tiam do mi rakontu de la komenco ...

„Mi ekiris al mia laborejo je la 8a horo ĉi-matene, kiel kutime, per metroo, trovis libron sur seĝo, prenis ĝin kaj eklegis.”

Ie sub lia kranio li sentis pikon. Li metis manon al la dolora loko kaj daŭrigis.

„Tiam mi havas iuspecan kvinhoran truon en la memoro, poste mi sentis min tre malbone, preskaŭ ne plu povis stari, mia kapo tre doloris ...”

„Kvin horoj? Tio ja estas tre longa tempo! Ĉu la unuan fojon tio okazas al vi?”

„Jes. Mi neniam spertis ion tian ... kaj tiu libro ...”

„Tiu libro?”

Li provis rememori, sed la informo ne venis. Pensi pri tio dolorigis lin. Intertempe la kuracisto aŭskultis lian koron per stetoskopo.

„Nu, mi prenos iom da sango por analizo.” Li iris kaj prenis tubon kaj injektilon.

Intertempe li cerbumis pri la libro, kiu ne lasis lin libera, io stranga estis pri ĝi ... li provis vidigi ĝin en sia menso. La libro simple kuŝis tie sur la apuda sidloko ... malhelruĝa kovrilo. JES! Nun li memoris! Kio estis la titolo? La kuracisto pikis lian brakon.

„AA!” li kriis! Nun li vidis la titolon antaŭ si: en tranco.

La kuracisto surprizite eltiris la injektilon. La vizaĝo de la paciento estis tordita.

Nun, kiam li memoris la titolon, ankaŭ la rakonto revenis kiel martelego en lian vizaĝon. Ĉiu vorto de la rakonto revenis en lin: Konfuzite li metis la libron apud sin. La kovrilo montris malhelajn makulojn, kie liaj humidaj fingroj ĵus tenis ĝin. Lia gorĝo male sentiĝis seka kiel korko kaj lia lango similis al sekiĝinta limako, kiu kun ĉiu movo algluiĝis al dento, retirebla nur kun dolorpiko. Estis, kvazaŭ ĉiu likvo el lia buŝo migrus al liaj manoj, kie ĝi eliris el la poroj. Tiel devus senti sin drogulo, kiu bezonas sian bonfartigan substancon.

Lode VAN DE VELDE



Internacia miskompreno



Antaŭ nelonge subaŭdiĝis en Dublino la sekvanta konversacio inter maljuna irlanda kamparano kaj usona turistino. Por aprezi la situacion, oni devas scii, ke la vorto *hooker* [huka] (pluralo: *hookers*) havas tute malsamajn signifojn en Irlando kaj en Usono. En la unua lando, ĝi signifas tradician velŝipon, antaŭe uzatan en okcidentaj regionoj de la Verda Insulo (same kiel multaj maristaj terminoj la vorto supozeble devenas de la nederlanda lingvo). En la usonangla, tamen, *hooker* estas slanga vorto, kies signifo estas „ĉiesulino”.

Dum la renkontiĝo de la virino kaj la maljunulo, la unua, kiu laŭŝajne estas respektinda kaj iom konservema persono, iom ŝokite menciis, ke ŝi neniam supozis, ke estas tiom da *hookers* en katolika Irlando. Tiu impresio estis verŝajne

kaŭzita de la fakto, ke multaj irlandaj knabinoj estas edukitaj en konventaj lernejoj, kaj – kiel reago al tiu severa kaj pruda edukado – kelkaj el ili post la lernejoj jaroj ŝatas vesti sin mode malprude, per eta malsufiĉa bluzo kun profunda dekolto, kiu apenaŭ kaŝas la mamojn kaj lasas la umbilikan regionon tute nuda; plie, per tre kurtaj kalsonoj aŭ minijupo kaj pucaj! ŝuoj kun ege altaj kalkanumoj – do iom malbongusta kaj provoka al la junuloj, sed ne nepre uniformo de strataj virinoj. Ŝajnas, ke tia modo de vestaĵo vidiĝas en usonaj urboj, sed kutime nur en tiel nomataj „ruĝlampaj” kvartaloj.

Jen do, resumo de la konversacio:

Usonanino: „Mi neniam imagis, ke estus tiom da *hookers* en Irlando.”

Maljuna irlandano: „Bedaŭrinde, hodiaŭ troviĝas multe malpli ol kiam mi

estis juna. Temas pri preskaŭ forgesita metio.”

Usonanino: „Pardonu?”

Maljuna irlandano: „Mi rememoras – mia avo ofte rakontis, kiel li je sunsubiro ŝatis vidi pasi la *hookers*, ĉiujn beligitajn per ruĝa tolo. Oni uzis ilin precipe por transporti torfon al la insuloj.”

Usonanino: „Dio mia! Mi vidas, ke la kutimoj en ĉi tiu lando kaj en Usono tute malsamas.”

Maljuna irlandano: „Ĉu?”

Usonanino: „Vere hontindaj!”

**Irlanda Hooker
Albisturo KVINKE**

1. Puca: neologismo – Tro ŝargita de ornamoj malbongustaj (PIV).



Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj

Lidia Zamenhof

La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof, kompilita de Jean Amoureux, Zofia Banet-Fornalowa, Masayosi Higasida kaj Bernhard Westerhoff, kun antaŭparolo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

La vivon de Lidia Zamenhof, plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, stampis la du mond-militoj. La unuan ŝi travivis adoleske kaj dum la dua ŝi pereis koncentre. Ŝiaj en tiu ĉi volumo kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikan bildon de la periodo intermilita. Ili sumigas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi kaj mobilizi. Ŝi volis ilin savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.



Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko

Paĝoj: 430

Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2009

ISBN: 978-90-77066-38-6

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de:

Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net
retbutiko@fel.esperanto.be

anoncetoj

Vizitu Iperity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iperity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF** kune kun Monato! Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo", kaj kun prelego pri la 30-jara ekzisto de Monato. Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpage provkzempler. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



Ĉu vi jam legis?



Plej furoris en 2009

1. Anna Löwenstein: Morto de artisto
2. Ilustrita oficiala radikaro
3. Charles Darwin: Origino de specioj
4. La Jaro 2010
5. Lidia Zamenhof: Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj
6. Trevor Steele: Kvazaŭ ĉio dependus de mi
7. Jean Codjo: Aventuro en mondo de ŝajnigado
8. Wendy Heller: Lidia
9. Christian Declerck: Spitaj kiel hidrargo
10. Stefan MacGill: Nemave edifi
11. Anna Löwenstein: La ŝtona urbo
12. Hergé: La nigra insulo
13. Lena Karpunina: Neokazinta amo
14. Carlo Collodi: La aventuroj de Pinokjo
15. Petro De Smedt: Poŝvortareto Esperanto-Nederlanda-Esperanto
16. Ziko van Dijk: La Asocio
17. Ulrich Matthias kaj Didi Weidmann: Kleines Wörterbuch Deutsch-Esperanto-Deutsch
18. Van Damme kaj De Vleminck: Grammaire ABC
19. Willy Vandersteen: La brusela bubo
20. Wandel/Galadi: La kosmo kaj ni
21. Jean Codjo: Dialogo inter surduloj
22. Katalin Kovacs: Poŝamiko
23. Pessata: Zamenhof, mondcivitano
24. Claude Piron: Gerda malaperis
25. Stefan Maul (red.): Tempo fuĝas

La jenaj 25 verkoj en la Butiko de Flandra Esperanto-Ligo plej furoris en 2009.

Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en www.retbutiko.net, sed vi povas kompreneble skribi ankaŭ per la „klasika poŝto“ al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.